

Gazeto



Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

22-a Jarkolekto * Junio 2005 * N-ro 78

[ISSN 1576-0618]

KONGRESLIBRO



11-a
ANDALUZA KONGRESO
DE ESPERANTO
Malago, la 8-an kaj 9-an
de oktobro 2005

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ
REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184,
29080 MÁLAGA, esperanto@ciudadfutura.com)
José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
(esperanto14@supercable.es)

COLABORADORES: Luis SERRANO PÉREZ, José Antonio VALVERDE
MARTÍN, D-ro Wolfgang GUNTHER, Ángel ARQUILLOS LÓPEZ,
Tonjo del BARRIO

ENHAVO

Salutvortoj	3
Sevilja Esperanto-Asocio	5
Kordova Esperanto-Asocio	7
Jaena Esperanto-Asocio.....	8
Onuba Esperanto-Asocio	9
Programo de la	
11-a Andaluza Kongreso de Esperanto.....	10
Prelegoj	12
La Alkazabo de Malago	14
Heraklo kaj la Andaluzia Blazono	16
Notoj	18

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aýtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.

Salutvortoj...

Karaj sinjorinoj kaj sinjoroj, mi salutas vin kun kora gratulo kaj bonvenigas vin al nia regiona kongreso de Esperanto. Post la pasinta sukcesa kaj fruktodona Kongreso okazinta en la urbo Sevilo, pasintjare, la ĉeestantoj de Malago tuj pripensis novan renkonton de andaluzoj en nia urbo kun la celo egali aŭ superi tiun eventon, oni devas klarigi, ke egali aŭ superi ilin, ne estas batalo kontraŭ ili sed tute kontraŭe, tio estas ĉies sukceso; ĉu ni sukcesos? Ĉu ni egalos la alian? Mi kore deziras tion kaj pro tio ni iluzie laboradas.

Ni havas avantaĝon rilate al ili, ĉar la evento riĉiĝas dank'al la seminario pri esperantologio (pri historio, literaturo kaj kulturo de Esperanto) gvidata de la eminenta preleganto, verkisto, profesoro kaj prezidanto de la Komitato de Esperanto Pen-Centro, sinjoro Giorgio Silfer kaj la postkongresa kuniĝo pri la unua parlamenta sesio de Esperantio en nia lando, tio signifas kion? Ke grava grupo de eŭropanoj ĉeestas la kongreson, do nia evento fariĝas speciala ĉar ni havos la ŝancon saluti persone ne nur niajn samregionajn sed parto de la ĉefajn membrojn de Esperantio.

Oni ne devas forgesi, ke en la urbo Malago antaŭ pli ol 100 jaroj naskiĝis grupo de Esperanto kaj, orgojle mi rimarkas, ke Malago estis unu el la pioniraj grupoj de Eŭropo, en tiu tempo oni verkis la unuan hispanlingvan metodon pri nia lingvo. Hodiaŭ estas speciala tago por mi ĉar mi neniam staris antaŭ publiko kaj, fari paroladon ne estas facila afero, eĉ hispanlingve mi ne kuraĝas, pro tio, mi kunportas plenumitan paperon enhavanta ĉion kion, per nia mirinda lingvo, mi pripensis. Dum kelkaj monatoj per kunigitaj streboj de la lokanoj oni aranĝis la hodiaŭan eventon.

Bedaŭrinde mi ne spertas pri Kongresoj kiel estrarano, sed kun helpo de Julio Herrero, kasisto de AEU, kiu jam spertas pri aliaj kaj multe laboris por atingi nian hodiaŭan celon, ankaŭ la spertuloj pri komputiko David Rodríguez, sekretario de AEU, kaj Pablo Foche, respondeculo de Jaena Esperanto-Asocio, kiuj kune kun aliaj gesamideanoj programis la belan andaluzan TTT-paĝon, bonega ilo de interkomuniado, kie aperas detala ka valoro anonco pri la nuna Kongreso kaj pluraj eventoj, membroj el proksimaj kaj malproksimaj urboj kiel: Kordovo, José María Rodríguez, respondeculo pri propagando, sindonema laboranto de Esperanto kaj eldonanto de nia *Gazeto Andaluzia*, la kongreslibro kaj multaj aliaj aferoj. Sevilo, Jaeno, Onubo, Granado ktp, en tiu ĉi momento mi fiere staras antaŭ vi ĉeestantoj, partoprenantoj kaj kunlaborantoj por ĝui la "feston", jes mi diris feston kaj mi

ne eraris ĉar Kongreso de Esperanto ne devas esti serioza instrua kaj eduka evento pri ia ajn grava temo sed laŭ mi, ĝi devas esti vera festo pri amikeco kaj frateco inter la homoj por interparoli, plibonigi kaj purigi nian parolmanieron, do mi konsilas al vi ĉiuj konversacii esperante por helpi precipe la izolitajn esperantistojn kiuj loĝas en malgrandaj vilaĝoj kaj iluzie kaj ĝoje ĉeestas la kongreson por pritrakti la lingvon, tute ne gravas se oni ne parolas sufiĉe bone, tute ne gravas se oni miksas naciajn vortojn, tio estas normala kiel normala estas inter ni korekti niajn erarojn unu la aliajn kaj samtempe riĉigi niajn konojn pri la lingvo. Nia kongreso sukcesos se ni la tutan tempon parolas kun entuziasmo pri Esperanto, do oni nepre devas paroli kvazaŭ ni estus en Esperantio.

Mi certas, ke la partoprenantoj de nia Kongreso surprizos nin per interesa kaj riĉa programo. Mi finas mian mallongan paroladon dankante vian ĉeeston kaj dezirante ĉion bonan dum la daŭro de la Kongreso.

ANGEL ARQUILLOS

Prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Ĉu vi scias, ke.....

en Malago oni eldonis la unuan libro-metodon pri la internacia lingvo Esperanto en la hispana?

Jes, en la jaro 1890 José Rodríguez Huertas publikigis en Malago la libron "Gramática, Ejercicios y Diccionario de la Linguo Internaciona del Doctor Esperanto". Temis pri la unua metodo por hispan-lingvanoj cele lerni la lingvon ĵus-naskita en Varsovio.

Sevilja Esperanto-Asocio

Karaj gesamideanoj:

Mankas nur kelkaj tagoj por nova iluzianta renkontiĝo en Malago inter la andaluzaj esperantistoj. Denove la andaluzaj esperantistaro volas unuigi siajn fortojn en regiona kongreso kaj kune ĝui esperante.

La pasintan jaron okazis la 10-a Andaluzaj Kongreso de Esperanto en Seviljo kaj, laŭ nia opinio, ĝia sukceso estis nek la granda ĉeesto de esperantistoj nek la gravaj prelegoj, nek eĉ aliaj agadoj kiuj certe okazis tiam. La plej grava efiko estis la konscio kiun ni akiris pri la bona sanstato kiun ĝuas la esperantistaro, danke al la engaĝiĝo de kelkaj esperantistoj kiuj ĉiam pretas labori por la movado, kaj la kompreno de nia anaro kiu dum la tuta jaro daŭris laborante pri malsamaj aferoj rilate al Esperanto.

Post tiu kongreso mi konsciiĝis pri grava paradokso: ni ne bezonas tro zorgi pri pene varbi esperantistojn (kiel mi antaŭe pensis), por plibonigi nian movadon sufiĉas nur serioze labori, eĉ silente, kaj ĉio alia alvenos krome.

Ekde ĉi tie, mi volas sincere danki kaj gratuli kelkajn andaluzajn esperantistojn pri kiuj mi certe konas siajn silentajn penojn, kiuj estas la ĉefa kialo de nia kreskado. Mi neniun volas citi speciale ĉar neeviteble mi forgesus iujn, kaj tion mi ne volas, sed sufiĉos nur rememorigi al vi kelkajn sinsekvajn agadojn kiujn oni ne plenumiĝas solaj: ĉiumonatajn gazeton, aranĝadon de kongresojn, ricev kaj akompani fremdajn esperantistojn kiuj pilgrime alvenas en niajn urbojn, ĉeesti aliajn renkontiĝojn nome de Andaluzio, instrui esperanton, ktp, ktp, ktp... kaj kompreneble ĉiam, ne nur tute senpage, sed eĉ elspezante sian propran monon.

Sed nun ni devas ne malantaŭe rigardi sed situigi en la estanteco, kaj nun nia estanteco estas sendube la 11-a Andaluzaj Kongreso de Esperanto kiu baldaŭ okazos en Malago, kaj instigi vin ĉeesti kaj kunlabori en ĝia sukceso.

Ni devas ne nur partopreni tiun kongreson, sed ankaŭ kaj ĉefe klopodi ĝui ĝin. Tio estas la sekreto por sukcesigi ĝin. Nur se ni ĝuas ni volos ĉeesti la venontan kongreson. Kaj por facile ĝui ni devas kompreni kaj konstati, ke Esperanto estas ne nur facila kaj bela, sed ĉefe tre praktika lingvo.

Alia grava afero pri kiu mi volas averti kaj pri kiu ni forte devas zorgi, estas la “danĝera postkongreso”. Ofte post la kongresoj, eĉ se ĝi plene sukcesis, okazas rilaksado kaj tio estas grava risko se ni ne estas atentaj. Ĉiuj pensas, ke la laboro jam estas farita kaj oni ne bezonas pli labori, sed tio estas grava eraro, estas tiam kiam oni bezonas pli kaj pli labori, kaj kiam ni devas profiti la favoran etoson kiu restas post la kongreso. Sed ni ankaŭ devas esti realistaj, kaj scii, ke por iluziigi la homojn oni devas oferti ion al ili, tial ni devas daŭri senĉese pensante pri novaj eblecoj por plibonigi niajn homajn rilatojn kaj sekve nian movadon.

Do, nur restas al mi atendi vin en la kongreso, kaj instigi vin por oferi vian laboron por organizi dum la venonta jaro 2006 la 12-an andaluzan kongreson, en via urbo, kial ne? Nun vi havas perfektan eblecon rimarki kaj lerni de la neeviteblaj kaj bezonataj malkonsentoj, kaj pliperfektigi ĝin, laŭ via penso, por la venonta jaro. Kuraĝigu vin!



La rivero Gvadalkiviro kaj la Turo de l'Oro en Seviljo.

Ĉu vi scias, ke.....

en Malago aperis la unua ZEO (Zamenhofa aŭ Esperanto-Objekto) en la mondo? Jes, fine de la 19-a jarcento oni registris en Malago ŝipon sub la nomo *Esperanto*, kiu navigis ĝis la mezo de la 20-a jarcento. La ŝipo apartenis unue al ŝipo-kompanio kiu sidejis en Malago kaj fine ĝi navigis en la Kanaria Insularo. Tiu ŝipo *Esperanto* estis la unua objekto kiu ricevis la nomon de la nova internacia lingvo en la tuta mondo.

Kordova Esperanto-Asocio

Bonvenon en la 11-an Andaluzan Kongreson de Esperanto. La movado en Kordova nuntempe stagnas, malgraŭ tio ni rajtas rakonti kiel grandan sukceson dum la kuranta jaro la publikigo fare de la Universitato de Kordova de verko pri la elstara kordova arkitekto Francisko Azorín Izquierdo, enhavanta eseon, inter aliaj, speciale verkita por pristudi la esperanto-agadojn de Francisko Azorín. La prezentado de la libro okazis komence de la jaro en la Kordova Urbodomo kaj reprezentanto de la Kordova Esperanto-Asocio estis speciale invitata ĉeesti la akton.

Malgraŭ tiu evidenta sukceso, estas necese pligrandigi la nombron da gelernantoj de la internacia lingvo kaj por atingi tion neprigas la okazigon de kurso, se eble universitat-nivele. Jen niaj celoj por la venontaj jaroj:

- daŭre kunlabori kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj kun la ceteraj lokaj esperanto-asocioj.
- Kontakti kun tiuj personoj en nia provinco kiuj lernas esperanton izolite, ĉefe pere de Interreto.
- Komencigi la demarŝojn por organizi novan esperanto-kurson, pli bone se temas pri kurso en la Universitato.

Espereble ĉi tiu 11-a Andaluza Kongreso de Esperanto estos bona scenejo por pritrakti la estontecon de nia lingvo en Andaluzio kaj kompreneble por ĝui internacian kaj amikecan etoson parolante nian tutmondan lingvon.



Jaena Esperanto-Asocio

Nome de Jaena Esperanto-Asocio bonvenon en la 11-a Andaluzan Kongreson de Esperanto. Dum la kuranta jaro nia asocio daŭrigis la agadojn por diskonigi sian ekziston ĉe la jaena socio, do kompreneble tio signifas ankaŭ sciigi pri la ekzisto de esperanto mem. Tiel aperis antaŭ kelkaj monatoj intervjuo kun tri membroj de la asocio en la ĵurnalo *Ideal*. Same ni daŭrigis la kontaktojn kun la Popola Universitato de Jaeno por organizi oficialan kurson de la internacia lingvo en tiu centro. La Popola Universitato ne estas ekzakte *universitata* instrujo, sed ja organismo dependanta de la jaena urbodomo kie oni instruas malsimilajn aferojn.

Sukcese ni atingis akordon kun tiu Popola Universitato kaj ĉi tiel dum la kurso 2005 / 2006 ni instruos esperanton tie kun oficiala agnosko. La instruisto de la kurso estos Jordi Lietor, kiu havas grandan sperton pri lingvo-instruado ĉar li jam instruis la germanan lingvon same en la Popola Universitato. En la organizado de la kurso, kune kun Jaena Esperanto-Asocio, kunlaboros Andaluzia Esperanto-Unuiĝo mem.

Do, tiu estas nia ĉefa celo por la venonta jaro: atingi sufiĉan nombron da gelernantoj de la internacia lingvo en la Popola Universitato kaj tiel ni povos certigi la okazigadon de la kurso dum la venontaj jaroj.



La Katedralo en Jaeno

Onuba Esperanto-Asocio

Teatro dum la Kongreso

Membroj de la Onuba Esperanto-Asocio prezentos dum la 11-a Andaluzia Kongreso de Esperanto teatro sub la titolo:

RENDEVUO EN SAMARO

Temas pri popola rakonto, kiu temas pri neevitebleco de la fina destino de ĉiu homo, el kiu neniu iel ajn povas eskapi. Ĉi fakto estas sama por ĉiuj homoj, kiel oni povas rimarki en la rakonto mem, kaj kiel tiom bone skribis Jorge Manrique en poemo belege tradukita de Fernando de Diego:

*Tien iras fluoj famaj
kun humilaj kaj kun mezaj
al la feĉo;
tie ĉiuj estas samaj
la subul' kun taskoj pezaj
kaj la reĝo.*

Ni prezentas nun, por ĉiuj kongresanoj, teatritan version, ornamita de muziko. Ni profitas ĉi ŝancon por voki ĉiujn interesatojn fondi teatran esperanto-grupon en Andaluzio al kunlaboro por la realigo de tiu revo.



Monumento al Kristoforo Kolumbo
en Onubo.

11-a Andaluza Kongreso de Esperanto

Sabaton la 8-an de oktobro

(Koridoro kaj Salono Benamargosa)

10,00 / 11,45 **Akceptejo**
(disdonado de dokumentaro al gekongresanoj)

(Salono Canillas de Algaida)

11'45 **Inaŭguro** (Urba Magistratano, prezidantoj de AEU kaj de Malaga E-Grupo).
Salutvortoj (de la delegitoj de la ĉeestantaj grupoj).

12'00 **Akto kunmemore al la 4-a Centjariĝo de Don Kihoto.**
(Publika legado de la du unuaj ĉapitroj de la verko "La Inĝenia Hidalgo Don Quijote de la Mancha" fare de esperantistoj el 12 diversaj landoj).

12'30 **Prelegoj.**
1. "Don Quijote en ne hindoeŭropa lingvo: la hungara traduko" de la profesoro Giorgio Silber.
2. "La unua Ilustrita Vortaro de Esperanto verkita de andaluzo. Francisko Azorín Izquierdo, 1955" de la AEU-estrarano José María Rodríguez Hernández.

14'00 **Tagmanĝo.**

16'30 **Teatraĵo** (aranĝita de Onuba Esperanto-Asocio).

17'00 **Esperanto en aliaj landoj** (kun partopreno de la eksterlandanoj ĉeestantaj).

18'00 **Projekcioj** (filmoj, videoj, DVD, lumbildoj).

19'00 **Esperanto en Andaluzio** (debato pri la movado en nia komunumo).

21'00 **Noktomanĝo.**

De la 10'00a ĝis la 21'00a horo funkcios la informejo por informi al la gekongresanoj kaj al la ĝenerala publiko.

Ekspozicioj

- Libroj en esperanto kaj aliaj organizata de AEU.
- Filatelaĵoj en esperanto de Cao Xionglin, prezidanto de Nanchang-a Esperanto-Asocio).

Dimanĉon, la 9-an de oktobro

(Koridoro kaj Salono Benamargosa)

10'00 **Vizito al la urbo** (per duetaĝa turisma aŭtobuso).

14'00 **Tagmanĝo kaj adiaŭo.**


Dum la unua tago de la Kongreso funkcios **libroservo** (kursoj, libroj, vortaroj, diskoj, videoj, DVD, ktp...) de SATEH kaj ankaŭ de AEU.

Prelegoj

*** La Profesoro Giorgio SILFER parolos pri :
“Don Quijote en ne hindoeŭropa lingvo: la hungara lingvo”**

La D-ro Giorgio SILFER estas sufiĉe konata ene de la E-literaturo, li estas aŭtoro de kelkaj libroj kaj tradukoj kaj eĉ aktiva membro de la esperanto-sekcio de la PEN-klubo.

La D-ro SILFER jam kunlaboris kun la andaluza E-movado, kaj tiel dum la pasinta jaro li prelegis okaze de la Zamenhofa Festo en Malago pri la temo “La Centjara Fundamento”. Ĉi-foje Giorgio SILFER pritraktos la temon pri la traduko de Don Kihoto en la hungara lingvo.



Kovrilo de la traduko de
“Don Kihoto” en la hungara lingvo
eldonita en Budapeŝto en la jaro
1959.

*** José M^a Rodríguez Hernández parolos pri:
“La unua Ilustrita Vortaro de Esperanto verkita de andaluzo.
Francisko Azorín Izquierdo, 1955”**

José M^a Rodríguez estas estrarano pri propagando de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj redaktoro de la oficiala organo de la asocio *Gazeto Andaluzia*. Li parolos pri la verko eldonita en la meksika ekziliejo de la kordova arkitekto Francisko Azorín Izquierdo en la jaro 1955.

Temas pri verko tute ne-konata en la esperanta literaturo, eĉ siatempe akre fornegita, tamen oni ne povas nei la enciklopedian valoron de ĉi tiu vera ilustrita vortaro kiu aperis eĉ 15 jaroj antaŭ la *oficiala* kaj vaste mond-konata "Plena Ilustrita Vortaro". La laboro de Francisko Azorín en la redaktado, ilustrado kaj mem-eldonado de ĉi tiu valora verko neniam ricevis la gratulon de la esperanto-komunumo kaj verdire jam estas tempo ripari tiun forgeson.

Kiel kontakti en Interreto kun la esperanto-asocioj de Andaluzio:

- Andaluzia Esperanto-Unuiĝo: **andaluzia@esperanto-andalucia.org**
- Sevilja Esperanto-Asocio: **sevilla@esperanto-andalucia.org**
- Kordova Esperanto-Asocio: **cordoba@esperanto-andalucia.org**
- Jaena Esperanto-Asocio: **jaen@esperanto-andalucia.org**
- Onuba Esperanto-Asocio: **huelva@esperanto-andalucia.org**
- Aksarkio (orienta parto de la malaga provinco) vizitu:
<http://es.geocities.com/lorcacola/esperanto.htm>

TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo:
www.esperanto-andalucia.org

Ĉu vi scias, ke.....

en Malago (urbo kaj provinco) ekzistas jenaj ZEO-j (objektoj kun la nomo *Esperanto* aŭ *Zamenhof*)

- Strato *Esperanto* en Malago
- Trapasejo *Esperanto* en Malago.
- Avenuo *Esperanto* en Torokso (Malago)
- Bestkuracistejo en Malago

Krome ekzistas trinkejo kaj supervendejo kun la nomo *Esperanto* situitaj ĉe la strato *Esperanto* en Malago.

La Alkazabo de Malago

Historiistoj diskutas pri la ebla fenica origino de ĉi tiu fortikaĵo, tamen evidenta estas la fakto, ke la malaga alkazabo stariĝas sur romiaj restaĵoj. La alkazabo de Malago, starigita de Badis Maksan, sub la regado de la kordova emiro Abd-Al Rahm la unua, estis la sidejo de islamaj reĝoj kaj guberniestroj. Dum la 13-a jarcento la alkazabo estis reformata kaj unuigita al la kastelo Gibralfaro. Post la kastilia konkero la Katolikaj Gereĝoj pendumigis la krucon kaj sian standardon sur la ĉefturo.

La alkazabo de Malago estas komparebla kun tiu de Almerio, kvankam ambu arkitekturaj stiloj estas tute malsimilaj. La kastelo Gibralfaro kaj la alkazabo estas unuigitaj per duoblaj ascendantaj muregoj. La ĉefa kialo por la konstruo de la alkazabo estis defendi la urbon Malagon. Tiel, ununamomente



ekzistis 30 defend-turoj kaj 20 pordegoj strategie situataj por malfaciligi la eniron en la fortikaĵon. Ene de ĝi eblas trovi belajn ĝardenojn kaj banejojn.

La interna fortikaĵo ĉirkaŭas la superan parton kaj ĝi utilis por defendi la sudan marbordon kaj la orientan parton de la urbo. La ekstera parto ebligas defendi la okcidentan parton. La ĉefturo estas la plej alta turo el la fortikaĵo kaj ĝi estas kvadrato kiu hodiaŭ prezentas kristanan konstru-stilon.

Ene de la interna parto de la alkazabo ekzistas nazarian palacon konstruita dum la 11-a jarcento, ekzistas ankaŭ kvartalo kun hispan-arabaj domoj kaj moskeo. Ene de la palaco estis eble vidi tri sinsekvajn ĝardenojn. Belegaj tiuj de la akvo-spruĉoj kaj de la oranĝ-arboj.

Nuntempe la alkazabo apartenas al la Malaga Urbodomo kaj ene de ĝi eblas viziti arkeologian muzeon. En la jaro 1931 oni deklaris ĝin “Nacian Monumenton” kaj en la jaro 1993 la andaluzia registaro enskribis ĝin ene de la listo de andaluzaj protektindaj kasteloj.



La Alkazabo de Malago

Ĉu vi scias, ke.....

en Malago okazis la Hispana Esperanto-Kongreso de la jaro 1959?
Jes, la jaro 1959 estis jubilea jaro por la tutmonda esperantistaro, ĉar oni solenis la unuan jarcenton de la naskiĝo de Lazaro Zamenhof, la aŭtoro de la internacia lingvo. Solene al tio la Universala Kongreso okazis en Varsovio (Pollando), patrujo de Zamenhof. La hispana esperantistaro elektis por okazigi la Hispana Esperanto-Kongreso de tiu speciala jaro la urbon Malagon.

Heraklo kaj la Andaluzia Blazono

En la Kongreslibro de la pasinta Andaluza Kongreso de Esperanto ni parolis pri la andaluzia standardo, kaj kiel, koincide aŭ ne, la koloroj de la andaluzia standardo kaj tiu de la E-movado similas. Ĉi-foje ni parolos pri la andaluzia blazono, kaj pri la historio de la mitologia ĉefrolulo de la blazono, Heraklo. La artikolo 5-a de la Andaluzia Aŭtonom-Statuto diras, ke la simboloj de Andaluzio, do, standardo, blazono kaj himno, estas tiuj adoptitaj de la Asembleo de Ronda okazinta en la jaro 1918. Blas Infante, andaluzia naciisto kaj esperantisto, diris pri la simboloj adoptitaj tiutempe:

*La regionalistoj aŭ andaluzaj naciistoj nenion inventis.
Ni devis nur agnoski tion jam kreita de nia popolo
kiel pravigo de nia historio.*

Same Blas Infante, parolante en la jaro 1919 pri la andaluzia blazono diris: *la blazono de nia nacio estas tiu de la glora Kadizo, do Heraklo inter kolonoj, subpremante du leonojn, kaj super ili la latina enskribo Dominator Hercules Fundator. Piede de la blazono la diraĵo resumanta la kontribuon de la andaluza Heraklo "Andaluzio per si por Hispanio kaj la Homaro"*.



Blazono de Kadizo

Do, Heraklo ludas specialan rolon, verŝajne li okupas la ĉefan opozicion en la andaluzia blazono. Sed kiu estis tiu Heraklo kaj kian rilaton li havis kun Andaluzio?

Heraklo estis filo de la greka dio Zeŭso kaj de la ne-diino Alcmena kaj li reprezentas la forton. Post murdi sian edzinon, pro frenez-atako, la reĝo de la greka urbo Tirinto, kie li loĝis imponis al li dek du pruvojn, mitologie konataj kiel la dek du pruvoj aŭ laboroj de Heraklo .

El la dekdu pruvoj la tri lastaj rekte okazas en la regnolando Tarteso, kiu situigis en Andaluzio, proksimume sur la nuntempaj provincoj Onubo, Kadizo kaj Sevilo mortigi la giganton Gerionon kaj rabi liajn bovojn.

La deka pruvo plenumita de Heraklo estis mortigi la giganton Gerionon kaj rabi liajn bovojn. La greka poeto Estesikoro de Himero verkis en la jaro 590 a.K. jenan poemon:

“Kiel deka laboro oni ordonis al Heraklo serĉi la gregon de Geriono en Eriteia. En ĉi tiu insulo, situita apud la Oceano (temas pri la Atlantika Oceano), nuntempe nomita Tarteso loĝis Geriono. La korpoj de tri viroj formis la korpon de Geriono unuigitaj per la ventro. Li posedis ruĝan bov-gregon kaj dukapan hundon nomita Orto. Vojaĝante tra Eŭropo Heraklo serĉis la gregon de Geriono, li trapasis en Libion (temas pri Afriko) kaj tiam li starigis du kolonojn kiel monumentojn de sia vojaĝo por fiksi kie finiĝis kaj komenciĝis Afriko kaj Eŭropo”.

Ĉi tiuj kolonoj estas tiuj kiuj aperas en la andaluza blazono kaj laŭ la legendo la kolono starigita de Heraklo en Afriko estas la monto Abila en la maroka Atlaso kaj la eŭropa kolono, tiu starigita en Andaluzio, estas la monto Calpe, do, la gibraltara roko. Aliaj versioj asertas, ke la andaluza kolono estas la roko ekzistanta en Martos (Jaeno). Heraklo kaj la kolonoj de li starigitaj aperas en la blazono de la urbo Kadizo, laŭ la legendo Tarteso starigis tre proksime al historia Gadir, la nuntempa Kadizo.

En la jaro 1918 la andaluzaj naciistoj renkontiĝitaj en la malaga urbo Rondo decidis adopti la kadizan blazonon kiel andaluzan blazonon adiciante nur sub Heraklo, la kolonoj de li starigitaj kaj la leonoj la devizo “Andaluzio per si por Hispanio kaj la Homaro”.

Blazono de Andaluzio



notoj ...

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López

Vic-Prezidanto: Rafael Sepúlveda Bernal

Sekretario: David Rodríguez García

Kasisto: Julio Herrero Segura

Voĉdonanto pri Propagando: José María Rodríguez Hernández

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: aarquillos@lycos.es
 esperanto14@supercable.es

TTT-paĝo: www.esperanto-andalucia.org

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

LA ESPERO

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Kompenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.